

I^pI

Informilo *por* Interlingvistoj

32-a jaro (kvara serio) ♦ ISSN 1385-2191 ♦ n-ro 123–124 (2023:2–3)

Eldonas

Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED)

www.esperantic.org ♦ esfacademic.org ♦ esfconnected.org

interlingvistiko.net ♦ [@esperanticsf](https://www.facebook.com/esperanticsf) ♦ [@esfacademic](https://www.facebook.com/esfacademic)

www.facebook.com/esperantic

Redaktas

Başak ARAY  ♦ KIMURA Gorō Christoph (木村 護郎 クリストフ) 

Jorge Antonio LEONI DE LEÓN  ♦ Bengt-Arne WICKSTRÖM 

Por kontakti la redakcion: IpI@interlingvistiko.net

ENHAVO

I	Eventoj	4
1	9-a Nitobe-simpozio, 2023-07-28/29	4
1.1	Organizantoj	4
1.1.1	Loko	4
1.2	Temo	4
1.3	Priskribo	4
1.4	Programo	5
2	Espéranto Paradigme III : Sociétés transnationales et sociabilités nouvelles / Trans-	
	nationale Gemeinschaften und neue Soziabilitäten, 2023-07-5/7	7
2.1	Organizantoj	7
2.1.1	Loko	7

2.2	Programo	7
3	Diskutro kadre de Japana Esperanto-Kongreso, 2023-07-29	9
3.1	Temo	9
3.2	Priskribo	9
4	45-a Esperantologia konferenco, kadre de la 108-a Universala Kongreso de Esperanto, 2023-08-03/04	9
4.1	Organizantoj	9
4.1.1	Loko	9
4.2	Programo	10
II	Universitata kaj esplora agado	11
1	Filmo pri la Esperanto-fako en Universitato de Zaozhuang, Ĉinio	11
2	Magistraj Studoj en Universitato Adam Mickiewicz, Pollando	11
3	Instruista Trejnado en Universitato Adam Mickiewicz, Pollando	11
3.1	Kondiĉoj por aliĝo	12
4	Esplorstipendio Boulton al Cecilia Giardini	12
5	Projekto Ellenberger	13
6	Esplorprojekto pri diversaj eblecoj de interlingva komunikado	13
6.1	Priskribo	13
III	Kulturo	15
1	Rakontoj de Eroŝenko aperas en anglalingva traduko	15
2	Nova aŭdgvidilo por la Esperantomuzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko	15
3	BBC publikigis videaĵon pri la planlingvo Interlingua pere de sia jutuba kanalo en la hispana lingvo (2023-01-26)	16
4	Ĝisdatigo pri la Tekstaro kaj PIV	16
5	Biblioteko Hodler iris al Varsovio	18
5.1	Malgranda biblioteka kolokvo inaŭguras novan epokon	19
IV	Personoj	22

1 Jubileo de Ilona Koutny (1953–)	22
1.1 Biografio	22
1.2 Selektita bibliografio	24
1.2.1 Artikoloj	24
1.2.1.1 1984 – 1989	24
1.2.1.2 1990 – 1999	24
1.2.1.3 2000 – 2009	25
1.2.1.4 2010 – 2019	28
1.2.1.5 2020 – nun	31
1.2.2 Vortaroj	31
1.2.3 Recenzoj	32
1.2.4 Redaktitaj volumoj	33
1.2.5 Aliaj redaktoraj aktivadoj	33
V Bibliografiaĵoj	35
1 Tezoj, disertacioj, diplomlaboraĵoj	35
2 Fakrevuaj artikoloj	35
3 Libroj	37
4 Revu-numeroj	38
4.1 Beletra Almanako	38
4.1.1 Enhavo	38
4.2 Esperantologio / Esperanto Studies	39
4.2.1 Enhavo	39
4.3 Investigationes Linguisticae	40
4.3.1 Enhavo	40

I EVENTOJ

1 9-A NITOBESIMPOZIO, 2023-07-28/29

1.1 Organizantoj

Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj, Ulster University, Università di Torino

1.1.1 Loko

Universitato de Torino
Centro Aldo Moro
Via Sant’Ottavio 18
Torino

1.2 Temo

75th Anniversary of the Universal Declaration of Human Rights: what is the status of the implementation of language rights?

75-a Datreveno de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj: kiu estas la stato de efektivigo de lingvaj rajtoj?

75e anniversario della Dichiarazione Universale dei Diritti Umani: qual è lo stato di attuazione dei diritti linguistici?

Laborlingvoj: angla, itala, esperanto. Samtempa interpretado provizita.

1.3 Priskribo

La ĝenerala temo de la Nitobe Simpozio estas la stato de efektivigo de lingvaj homaj rajtoj, 75 jaroj post la universala deklario de homaj rajtoj. La simpozio estas momento de pripensado kaj diskuto pri temo kiu akiris konsiderindan gravecon en la lastaj jaroj pro multaj kialoj, inkluzive de la kreskantaj internaciaj migradoj, la procezoj de kultura kaj lingva homogenigo ligitaj al tutmondiĝo, la cifereca revolucio kiu povas malfavori la lingvajn minoritatojn, kaj fine situacioj de armita konflikto en plurlingvaj landoj kiel Ukrainio. La Nitobe Simpozio dediĉos specifan sesion al la kazo de lingvaj rajtoj en Italio, inkluzive de tradiciaj minoritatoj kaj tiuj devenantaj el enmigrado.

1.4 Programo

Vendredo, 2023-07-28

- 08:30 Aliĝo
09:00 Bonvenigo kaj malfermo

Teoriaj aspektoj de lingvaj rajtoj

- 09:30 **Fernand de Varennes**
Speciala Raportisto de Unuiĝintaj Nacioj pri Minoritataj Problemoj
Prezento kaj diskuto de la raporto «Lingvaj Rajtoj de Lingvaj Minoritatoj: Praktika Gvidilo por Efektivigo» kaj de la «Propono por Tutmonda Konvencio pri Rajtoj de Minoritatoj»
- 10:05 **Robert Phillipson**
Kopenhaga Komerca Universitato
Prezento kaj diskuto de la libro «Manlibro pri Lingvaj Homaj Rajtoj»
- 10:40 **Bengt-Arne Wickström**
Andrássy-Universitato Budapeŝto
Indekso por taksi lingvan justecon trans landoj: Diskuto kaj prezento de kelkaj antaŭrezultoj
- 11:15 Kafopaŭzo
- 11:45 **Vicent Climent-Ferrando**
Universitato Pompeu Fabra – Unesko-Katedro pri Lingvaj Politikoj por Multlingvismo
Takso de la subteno de Eŭropa Unio al Regionaj kaj Minoritataj Lingvoj. 10 jarojn post la Alfonsi-Rezolucio
- 12:20 **Laure Clément-Wilz**
Universitato Parizo-Est Créteil
Lingvaj rajtoj kaj la Kortumo de EU
- 12:55 Tagmanĝo

Praktikaj aspektoj de lingvaj rajtoj

- 14:30 **Vicent Fenollar i Sastre**
Politika Administranto de NPLD-Reto por Antaŭenigi Lingvan Diversecon
Johan Häggman
Politika Konsilisto de FUEN – Federacia Unio de Eŭropaj Naciecoj
Kion povas kaj kion faru EU por minoritatoj aŭ regionaj lingvoj?
- 15:05 **Davyth Hicks**
Ĝenerala Sekretario de ELEN – Eŭropa Lingva Egaleca Reto
Respekti lingvan diversecon? Instituciaj obstakloj al lingva egaleco kaj rajtoj en Eŭropo
- 15:40 Kafopaŭzo

- 16:10 **James Archibald**
Universitato McGill / Universitato de Torino
Principoj por efektiviĝi integrajn lingvopolitikojn
- 16:45 **Francis Hult**
Universitato de Marilando
Lingvaj rajtoj en la sistemo de Unuiĝintaj Nacioj
- 17:20 **François Grin**
Universitato de Ĝenevo
Teoriaj kaj metodikaj iloj por la efektiviĝo de lingvaj rajtoj: Prezento de la libro «Routledge Manlibro pri Lingvo Politiko kaj Planado» kaj la revuo «Language Problems & Language Planning»
- 17:55 Fermo de la unua tago

Sabato, 2023-07-29

- 09:00 Resumo de la unua tago

La komplekseco de lingvaj rajtoj. La kazo de Italio kaj de eŭropaj institucioj

- 09:20 **Antonio Stango**
Prezidanto de FIDU-Itala Federacio de Homaj Rajtoj
Homaj rajtoj en lingve diversaj socioj
- 09:55 **Monica Barni**
Universitato por Fremdlandanoj de Sieno
Lingvaj rajtoj kaj migrantoj en Italio
- 10:30 **Giovanni Agresti**
Universitato Bordeaux Montaigne kaj reto POCLANDE
Minoritatoj en Italio kaj lingvaj politikoj
- 11:05 Kafo-paŭzo
- 11:35 **Ilaria Fiorentini**
Universitato de Pavia
La sociolingvistiko de minoritatoj en Italio
- 12:10 **Seán Ó Riain**
Eŭropa Esperanto-Unio
Lingvaj rajtoj kaj multlingvismo en EU
- 12:45 Konkludoj

2 ESPÉRANTO PARADIGME III : SOCIÉTÉS TRANSNATIONALES ET SOCIABILITÉS NOUVELLES / TRANSNATIONALE GEMEINSCHAFTEN UND NEUE SOZIABILITÄTEN, 2023-07-5/7

2.1 Organizantoj

Centre Alexandre Koyré, le Centre Marc Bloch, Universität Bonn et University of St Andrews avec le soutien de l'Université franco-allemande

2.1.1 Loko

EHESS, salle 25A (rez-de-chaussée)
Campus Condorcet
Paris
métro : Front populaire

2.2 Programo

Mercredi, 2023-07-05

10:00 Introduction par Pascal Dubourg Glatigny, Denis Eckert, Marcel Koschek et Bernhard Struck

Organisations internationales et sociabilités militantes : le défi de la communication

10:30 **Andrea Benedetti**
Université de Strasbourg
Les sociabilités informelles, outil de propagande de l'internationalisme socialiste (1889-1914)

Emil Eleftheriotis-Pratt

St. Andrews University

The International Falcon Movement-Socialist Education International (IFM-SEI) – The History of Childhood Youth Movements and Internationalism, and Shared Languages 1920-1992

Manuela Burghilea

St. Andrews University

“To the moon!”. Brazilian Esperanto Youth, from a National Project based on an International Language, to the Search of the Green Planet

La question de l'espéranto comme espace transnational

14:00 **Malte König**
Freie Universität Berlin
Esperanto as Cosmopolitics: Towards World Citizenship through Practice

Torsten Leuschner

Universiteit Gent

Plansprache als Traum und Vision: die internationale Welthilfssprachendebatte A.D. 1907

Marcel Koschek

Universität Bonn

Using Esperanto successfully: The Krakow World Congress in 1912 as a Transnational Area of Encounter

Biographies et trajectoires intellectuelles : la place de l'espéranto et des langues planifiées

16:00

Mégane Fernandez, Camille Dabestani

Université Paris I

La représentation des espérantistes sur Wikipédia

Başak Aray

Istanbul

La muséologie des savoirs d'Otto Neurath et les milieux des langues internationales

17:30

La sociabilité entre espérantistes en Afrique, un dialogue avec Joel Muhire (Nord Kivu, RDC)

Jeudi, 2023-07-06

L'engagement des femmes dans les mouvements transnationaux avant 1914

10:00

Lola Romieux

Université de Strasbourg

En marge de la Première Internationale : sociabilités féminines et recherche d'une identité militante jusqu'à la formation de relations transnationales (1864-1876)

Claire Taylor

St. Andrews University

Chemists, Missionaries, and Doctors in "the Athens of the North": Women and Esperanto in Scotland, 1906-1912

11:30

Julia Druelle

EHESS

Réaliser un court-métrage sur les lieux de l'espéranto en France

Les espérantistes et la contestation du colonialisme

14:00

Bipasha Bhattacharyya

University of Cambridge

Hindujoo and the Sindhvads: Belgian Esperantists on India

Guilherme Moreira Fians

St. Andrews University

Neutralizing the Political: Imperialism and the Third World in the Esperanto Youth Media, 1963-1980

16:00

Visite des collections de l'Humathèque et dialogue avec Céline Barbillon sur la question des collections en espéranto dans les fonds français

3 DISKUTRONDO KADRE DE JAPANA ESPERANTO-KONGRESO, 2023-07-29

3.1 Temo

Kompilado de la «postmilita historio» per eseoj de infanoj

Laborlingvo: japana

3.2 Priskribo

Lige al la mallongigo de la ĉi-jara Japana Esperanto-Kongreso de aranĝo tritaga al dutaga, oni okazigas kelkajn retajn antaŭaranĝojn de la kongreso por ne malriĉigi la kongresan programon. De januaro okazis jam tri tiaj, kaj por la vespero de la 29-a de julio estas planata la kvara sesio. La tiutaga evento temos pri la motivoj de esploristoj okupiĝi pri esploroj rilataj al Esperanto. Fakte de kelkaj jaroj la nombro de tiaj fakuloj japaniaj aŭ japanologiaj rimarkinde kreskas. Dum la sesio en la 29-a de julio du junaj esploristoj, SUNAGA Satoŝi (*Tenri-Universitato*) kaj TURU Syuntaro (*Universitato de Kioto*) specialiĝintaj respektive pri pedagogio kaj tajvanaj studoj, parolos pri siaj spertoj kunverki kun aliaj libron, (KOMAGOME Takesi [駒込武] k.a. (red.) 2020. 『生活綴方で編む「戦後史」』 [Kompilado de la «postmilita historio» per eseoj de infanoj]. Tokio: Iwanami), kiu provis meti projekton kolekti eseojn de diverslandaj infanoj en la kuntekston de la malvarma milito. La projekto bazis sin sur japana movado por speco de aŭtoetnografio, premisis la utiligon de Esperanto en la kolektado kaj tiucele dungis plurajn esperantistojn, kaj konkretiĝis en dek kvin librovolumojn sub la titolo Sekai no kodomo [Infanoj de la mondo] eldonitaj de la prestiĝa japana eldonejo Heibonsya en 1955-1957. Profitante la okazon oni alvokas partoprenon de interesitaj esploristoj kaj volas krei prian retliston komence japanian, estonte eble (orient-)azian.

Fonto: USUI Hiroyuki

4 45-A ESPERANTOLOGIA KONFERENCO, KADRE DE LA 108-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, 2023-08-03/04

4.1 Organizantoj

Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj: Javier Alcalde kaj Mark Fettes

4.1.1 Loko

Politecnico di Torino
Torino

4.2 Programo

Ĵaŭdo, 2023-08-03

Unua sesio

- 09:00 **Jouko Lindstedt**
Liberiĝi de interlingvistiko
- 09:30 **Klaus Schubert**
Kiel Esperanto eniris la semiologian vivon?
- 10:00 **Eric Macpherson**
Epistemologiaj konsideroj pri la studado de Esperanto
- 10:30 **Nicola Ruggiero**
Kompili Homeran leksikonon por havi vortaron
- 11:00 **Ilona Koutny**
Esperanto kaj universitato I. Studoj en Esperanto pri esperantologio kaj lingvistiko en AMU
- 11:30 Publika debato
- 12:00 Fino de la unua sesio

Vendredo, 2023-08-04

Dua sesio

- 09:00 **James Rezende Piton**
Neakceptebla lingvo – la poŝta cenzuro de korespondaĵoj en Esperanto kaj aliaj lingvoj tra la 20-a jarcento
- 09:30 **Joseph Essertier**
La nerealigita kaj forgesita potenco de Esperanto: Raciigi kaj demokratigi lingvon en Ĉinio
- 10:00 **Rubeno Fernández Asensio**
Esperantaj heredaĵoj en publikaj arĥivoj: ŝancoj kaj defioj
- 10:30 **Pascal Duboug-Glatigny**
El asocia arkivo al reta muzeo: la vojaĝo de Lucien Péraire (1928-1932) en la nuboj de ciferecaj homsciencoj
- 11:00 **Vicente Manzano-Arrondo**
Esperanto kaj universitato II. Strategio allogi profesorojn lerni Esperanton
- 11:30 Publika debato
- 12:00 Fino de la dua sesio

II UNIVERSITATA KAJ ESPLORA AGADO

1 FILMO PRI LA ESPERANTO-FAKO EN UNIVERSITATO DE ZAOZHUANG, ĈINIO

La 29-an de decembro, 2022, publikiĝis 5-minuta filmeto kiu prezentas la Esperantajn agadojn de Zaozhuang-Universitato en provinco Shandong de Ĉinio. La universitato havas registare agnoskitan kvar-jaran Esperantan fakon kaj la plej grandan Esperanto-Muzeon en la mondo. Du-lingvaj subtitoloj, en Esperanto kaj en la ĉina lingvo.

Fonto: <https://www.youtube.com/watch?v=y-iZ-R2dP2E>

2 MAGISTRAJ STUDIOJ EN UNIVERSITATO ADAM MICKIEWICZ, POLLANDO

Post 25 jaroj da funkciado de la postdiplomaj Interlingvistikaj Studoj en la studjaro 2022/23 en Universitato Adam Mickiewicz (Poznano, Pollando) startis la unuan fojon la 2-jaraj magistras studoj pri interlingvistiko por internacia studentaro enkadre de la fako Lingvistiko kaj Informmastrumado (en la Fakultato pri Modernaj Lingvoj kaj Literaturoj). Dum la inaŭgura studentaro (inter ili sep el la Universitato de Zaozhuang) nun eniras sian duan jaron, malfermiĝis aliĝoj por komenci la programon en septembro 2023. Reklamilo por la studoj estas inkluzivita kun ĉi tiu numero de IpI. ESF (Esperantic Studies Foundation) disponigos kelkajn stipendiojn.

Mallonga prezento kaj invito al la magistras studoj, farita de la studentoj de la unua jaro, estas spektebla ĉi tie:

<https://www.youtube.com/watch?v=m-MpZxrNdwk>

Pliaj informoj:

http://interl.home.amu.edu.pl/interlingvistiko/magistras_maj23_alvoko.html

3 INSTRUISTA TREJNADO EN UNIVERSITATO ADAM MICKIEWICZ, POLLANDO

La Interlingvistikaj Studoj de la Universitato Adam Mickiewicz (Poznano, Pollando), en kunlaboro kun Edukado.net kaj ILEI, denove organizas unujaran instruistan trejnadon, kiu disponigas la necesajn konojn kaj lertojn por instruado de Esperanto kaj trejnos la partoprenantojn pri metodiko. La kursaro necesigas partoprenon unufoje en la surloka intensa semajna sesio en Pollando (2023-09-09 – 15).

La sekvaj sesioj okazos rete: du semajnfinaĵoj renkontiĝoj en 2023, 4-taga sesio en februaro 2024 kun aldona ekzameno, kaj denove du semajnfinaĵoj printempe de 2024. Inter la retaj sesioj la partoprenantoj laboros hejme pri la ricevitaj taskoj, uzante ankaŭ la retejon de Edukado.net kaj konsultiĝos kun la kursgvidantoj. La trejnado estas specialiĝo de la 3-jaraj postdiplomaj interlingvistikaj studoj, kio signifas, ke temas pri la plej altnivela instruista trejnado, responda al la universitataj programpostuloj, kun teoria bazo kaj praktiko.

3.1 *Kondiĉoj por aliĝo*

Bona lingvoscio (min. B2, atestilo pri Esperanto-ekzameno estas bonvena) kaj baza kono de esperanta kulturo, krome finita mezgrada lernado (tipo de abiturienta ekzameno). Por fini la studojn necesos pretigi finlaboraĵon pri metodika temo, kies prezento kun la fina kompleksa (teoria kaj praktika) ekzameno okazos en septembro 2024. Aliĝantoj ricevos movadan-diplomon pri instruista trejnado.

Por pliaj informoj kaj aliĝo (limdato: 2023-08-15):

https://interl.amu.edu.pl/interlingvistiko/INSTR_TREJN_2023_anonco.html

4 ESPLORSTIPENDIO BOULTON AL CECILIA GIARDINI

La usona fondaĵo Esperantic Studies Foundation (ESF) aljuĝis la ĉi-jaran Esplorstipendion Marjorie Boulton al D-ro Cecilia Gialdini, postdoktoriĝa esploristo ĉe Ulstera Universitato, kies faka laboro fokusiĝas al la mezurado de lingva justeco.

Studante por doktoriĝo ĉe Ulstera Universitato, D-ro Gialdini identigis kernan mankon en la ekzistanta faka literaturo, nome la foreston de konkretaj mezuriloj kaj indikiloj por taksado de lingva justeco de lingvopolitikaj sistemoj. La rezultinta disertacio, «A Multidimensional Linguistic Justice Index: Measuring Language Policies through the Capability Approach», servis kiel fundamento por la Boulton-kandidatiĝo. Konstruante sur antaŭaj kontribuoj al taksado de lingva justeco, la disertacio traktas teoriajn kaj metodikajn demandojn en la konstruo de tia indekso. Inter aliaj celoj, la Stipendio Boulton subtenos la laboron transformi la doktoran tezon de Gialdini en libron ĉe internacia eldonejo.

Naskita kaj kreskinta en Toskanio sed nun adoptita de Belfasto, D-ro Gialdini posedas bakalaŭron en Politiko kaj Internaciaj Rilatoj, magistran gradon en Internaciaj Studoj, kaj PhD en Socia Politiko kun fokuso al Lingva Justeco. Ties pasio por lingvostudo aperis dum la esploroj por magistriĝo. Dum Erasmus-interŝanĝo ĉe la Universitato de Ĥajfo, Gialdini faris surlokajn esplorojn por sia fina tezo, fokusitajn al la rilato inter lingva diverseco kaj identeckonflikto en la Ŝtato de Israelo—specife ekzamenante la edukajn politikojn rilate al la palestinaj civitanoj de Israelo. D-ro Gialdini insistas pri la kerna graveco de lingva justeco en publikaj debatoj, ne nur pri homaj rajtoj sed ankaŭ rilate al politika stabileco kaj packonstruado.

La Boulton-Stipendio subtenas esplorojn en ĉiuj kampoj de la homsciencoj kaj sociaj sciencoj, precipe en rilato al interlingvistiko, lingva justeco, interkultura komunikado, Esperanto kaj parencaj fenomenoj. La Stipendio celas omaĝi la kontribuojn de la forpasinta D-ino Marjorie Boulton, fekunda aŭtoro de teatraĵoj, poemoj kaj prozo en Esperanto, kiu ankaŭ verkis la ĉefan anglalingvan biografion de L. L. Zamenhof. Antaŭaj stipendiuloj inkluzivas la postdoktoriĝajn esploristojn Edwin Michielsen (nun ĉe la Universitato de Honkongo) kaj Guilherme Fians

(nuntempe Leverhulme Research Fellow ĉe la Universitato de St. Andrews), kaj doktoran kandidaton Magdalena Madany-Saa, kiu lastatempe defendis sian disertacion ĉe Pensilvania Ŝtata Universitato, Usono.

5 PROJEKTO ELLENBERGER

En la lastaj monatoj de 2022, esperantistoj en Montrealo, Kanado, ekhavis kontakton kun la filino de mondfama kuracisto, historiisto kaj krimologo Henri Ellenberger. Naskita en 1905 en la sudo de Afriko, de protestantaj svisaj misiistoj, Ellenberger studis kaj vivis en Francio ĝis la Dua Mondmilito, elmigrante al Svislando en 1941. En Francio li lernis Esperanton kaj komencis skribi siajn taglibrojn en la lingvo. Li poste translokiĝis al Usono en la fruaj 50-aj jaroj, kaj fine al Montrealo en la finaj 50-aj, kie li instruis ĉe la universitatoj McGill kaj Universitato de Montrealo dum ĉirkaŭ tri jardekoj. Trejnita psikiatro, li famiĝis pro siaj esploroj pri la historio de psikiatrio, unuavice en la libro *The Discovery of the Unconscious* (La Malkovro de la Nekonscio), 1970). Li mortis en 1993.

La kolekto de taglibroj de Ellenberger ampleksas 41 volumojn kaj kovras periodon ekde 1940 ĝis la 70-aj jaroj (Francio - Svislando - Usono - Kanado). Montreala esperantisto Ĵenja Amis legis la unuan volumon, kiu temas pri la vivo en Francio sub nazia okupado kaj Vichy-reĝimo, eskapo al Svislando, kaj la vivo kaj laboro dum la milito. Krom du posedataj de la filino (1940-43 kaj 1959), ĉiuj aliaj volumoj troviĝas ĉe alia fama psikiatro, la estrino de *Société internationale d'histoire de la psychanalyse et de la psychiatrie*, Élisabeth Roudinesco. Ĉar finiĝis la embarga periodo post la morto de Ellenberger, eblas nun labori kun la dokumentoj. Kun la helpo de akademianoj el Francio kaj Kanado, Irène Ellenberger kaj montrealaj esperantistoj ŝatus publikigi la kajerojn ciferece kaj ankaŭ eventuale eldoni unu resuman libron surbaze de ilia enhavo.

Por pliaj detaloj kaj eventuala kunlaboro, kontaktu Esperanto-Societo Kebekia:

info@esperanto.qc.ca.

6 ESPLORPROJEKTO PRI DIVERSAJ EBLECOJ DE INTERLINGVA KOMUNIKADO

En 2022 ekis komuna esplorprojekto «Konstruo de nova paradigmo en interlingva komunikado: internacia komparo de «setuei»» (JSPS-esplorsubvencio (C) KAKEN 22K00822 (2022-2025), ĉefesploristo KIMURA Goro Christoph, kunesploristoj: ITOIGAWA Miki, Simon TUCHAIS, FUJII Kumiko, KADOYA Hidenori).

<https://kaken.nii.ac.jp/en/grant/KAKENHI-PROJECT-22K00822>

6.1 Priskribo

La projekto celas trovi trian vojon inter la senkritika akcepto de la angla kiel LA internacia lingvo kaj la kritiko de «lingva imperiismo». Pli detala priskribo legeblas en la sekva retejo en Esperanto, en la angla, ĉina, franca, germana, hispana kaj japana:

<https://syakaigengo.wixsite.com/home/setuei>

Por pliaj detaloj kaj eventuala kunlaboro, kontaktu KIMURA Goro Christoph:

g-kimura@sophia.ac.jp

III KULTURO

1 RAKONTOJ DE EROŜENKO APERAS EN ANGLALINGA TRADUKO

En marto 2023, ĉe Columbia University Press, aperis *The Narrow Cage and Other Modern Fairy Tales*, kolekto de 18 fabeloj plus kelkaj aliaj pecoj de Vasilij Eroŝenko, la blinda ukraina esperantisto-aŭtoro kies verkoj populariĝis en Japanio kaj Ĉinio en la 1920-aj jaroj. La tradukon faris Adam Kuplowsky el la japana kaj Esperanto, kaj la enkondukon verkis Jack Zipes, eble la plej fama usona specialisto pri la ĝenro fabeloj.

Fonto: <http://cup.columbia.edu/book/the-narrow-cage-and-other-modern-fairy-tales/9780231207690>

2 NOVA AŬDGVIDILO POR LA ESPERANTOMUZEO DE LA AŬSTRIA NACIA BIBLIOTEKO

Ekde la 15-a decembro 2022 la Esperantomuzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko ofertas aŭdgvidilon por siaj vizitantoj. Unue ĝi aperis en la germana kaj la angla, ekde majo 2023 ankaŭ ekzistas Esperanto-versio, kiu estis financita per la Esperantic Studies Foundation (ESF) kaj la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED).

Per rapidresponda kodo (QR code) la aŭdgvidilo kun ĉiuj tri lingvoversioj estas elŝutebla sur la saĝtelefonon. Pro tio ĝi ne nur estas aŭskultebla dum la vizito en la Esperantomuzeo, sed ankaŭ poste vizitantoj povas aŭskulti aŭ legi la tekstojn kaj uzi la ligilojn al la diversaj diĝitaj objektoj. La aŭdgvidilo donas aldonajn informojn al la vitrintekstoj en la Esperantomuzeo kaj enhavas jenajn ĉapitrojn:

- La Esperantomuzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko
- La tempo antaŭ Esperanto
- Lingva diverseco
- Volapuko
- Doktoro Esperanto
- Letero pri la deveno de Esperanto
- Natura evoluo
- Lingvo internacia

- Universalaj Kongresoj de Esperanto
- Lingua Franca en Siberio
- Esperanto – lingvo de paco
- Alfred Hermann Fried pri Esperanto
- Naziismo
- Iluzio kaj vizio
- Esperanto en muziko kaj filmo
- Literaturo en Esperanto

3 BBC PUBLIKIGIS VIDEAĴON PRI LA PLANLINGVO INTERLINGUA PERE DE SIA JUTUBA KANALO EN LA HISPANA LINGVO (2023-01-26)

La ĵurnalistino Laura García koncize kaj pozitive parolas pri la historio kaj la gramatiko de Interlingua. La lingvisto prof. Carlos Valcárcel Riveiro (Universitato de Vigo, Hispanio) plurfoje intervenas parolante en Interlingua kun la celo demonstri la facilecon tiu planlingvo por hispanlingvanoj; tial li mencias diversajn temojn kaj rapide prezentas la gramatikon, ĉio en Interlingua. La ĵurnalistino ankaŭ mencias kritikojn al Interlingua kaj substrekas, ke eblas kompreni tiun lingvon sen bezono de antaŭa studado.

La videaĵo, titolita «Interlingua: el idioma que millones pueden entender sin haberlo estudiado» (Interlingua: la lingvo, kiun milionoj povas kompreni sen antaŭa studado), kiu rapide atingis pli ol 100 000 spektintojn, estas videbla ĉe <https://youtu.be/VGiBpxG9QV8>. Ne temas pri la unua apero de Prof. Carlos Valcárce en granda medio; jam en novembro 2022 li estis intervjuita en la jutuba kanalo de franclingva semajna revuo Courrier International:


https://youtu.be/O6Xi_ztCWK8.

Artikolo originale aperinta ĉe <https://esfconnected.org/2023/01/31/bbc-interlingua/>

4 ĜISDATIGO PRI LA TEKSTARO KAJ PIV

La laboroj pri la Tekstaro de Esperanto (la Tekstaro), kaj pri la estonta versio de la Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto (PIV) progresas intense. La du projektoj, ambaŭ financataj de Esperantic Studies Foundation, praktike kunfandiĝis en unu projekton, ĉar la tekstoj en la Tekstaro estas abunde uzataj por provizi PIV-on per ekzemploj de reala uzo.

Ambaŭ projektojn gvidas Bertilo Wennergren. La laboron pri PIV tamen plenumas tute teamo, kiu diligente redaktas kaj korektas la vortaran materialon per interreta kunlabora platformo programita de Bertilo. Iuj el la PIV-teamanoj ankaŭ helpas vastigi la Tekstaron per novaj tekstoj, kaj per korektado de la jam ekzistantaj tekstoj.



FIGURO 4.1 Ekzemplo de PIV-pago

Al la Tekstaro estis lastatempe aldonitaj la jenaj tekstoj:

- Mirinda amo verkita de Luyken, eldonita en 1913
- Sinjoro Tadeo tradukita de Grabowski, eldonita en 1918
- Idoj de Orfeo verkita de Bulthuis, eldonita en 1923
- tekstoj el Revuo Esperanto de la jaroj 2002-2007
- La memoraĵoj de Julia Agripina verkita de Löwenstein, eldonita en 2021

Per tio la amplekso de la Tekstaro nun estas 11.728.313 vortoj.

La PIV-teamo volas profunde renovigi la vortaron, komencante novan ĉapitron en ĝia evoluo. La planoj enhavas interalie la jenajn punktojn:

1. Waringhien havis la ambicion, ke PIV iagrade povu servi kiel enciklopedio. Tiu celo estis nur parte plenumita. La artikoloj de iuj fakoj estas enciklopediecaj, dum aliaj estas nur

vortaraj. Nuntempe la taskon esti enciklopedio pli bone plenumas la Esperanta Vikipedio, kaj PIV prefere fariĝu pura vortaro. Vortaro difinas kaj klarigas vortojn, dum enciklopedio klarigas faktojn kaj fenomenojn. Praktike tiu ŝanĝo trafas precipe la botanikajn kaj zoologiajn artikolojn de PIV, kiuj ĝis nun nemalofte pli similas al eseetoj ol al vortaraj artikoloj.

2. Ĉiuj realaj ekzemploj (prenitaj el iu teksta fonto) estas kontrolataj kaj ĝustigataj. En la ĝisnunaj PIV-versioj multaj ekzemploj estas ŝanĝitaj kaj adaptitaj, kaj sekve ne ĉiam fidindaj. Tiu tasko estas grandega, sed progresas tre bone, precipe pro la eblo rapide kontroli multajn fontotekstojn per la serĉilo de la Tekstaro.
3. Ĉiuj realaj ekzemploj havos fontindikon. Tiuj ekzemploj, kiuj estas troveblaj en la Tekstaro estos provizitaj per ligilo al la koncerna loko en la Tekstaro. Per alklako al la fontindiko leganto estos sendita rekte al la koncerna tekstoloko kun la efektiva origina ekzemploteksto flave markita. Estas enkondukita pli rigora distingo inter efektiva vortfarado per Esperantaj elementoj, kaj pruntado de internaciaj vortoj. Ekz. la vorto antropometrio, kiu en PIV2020 estas prezentita kiel derivaĵo el la radiko antrop· (= homo) kaj la sufikso -ometri- (= mezurscienco), aperos estonte kiel la radiko antropometri· plus O-finaĵo, ĉar ne vere ekzistas en Esperanto ia sufikso -ometri-, nek ia radiko antrop·. La vorto estas prenita kiel tutaĵo el la internacia vortprovizo, kaj estu prezentita ĝuste tiel.
4. Ĉiuj derivaĵoj estos prezentitaj kun disigaj signetoj, kiuj evidentigas la kunmetitecon de la vorto. Ekz. la vorto malsuprenstreko aperos kiel mal·supr·e·n·strek·o.
5. Loknomoj havos en la difino anstataŭ geografiaj koordinatoj (ekz. “8°15'E, 48°45'N”) nacilingvaj nomojn, kio plifaciligos kontroli en enciklopedio aŭ alia fonto, pri kiu loko efektive temas.
6. Estos uzata multe malpli da mallongigoj. Ekz. anstataŭ k aperos kaj; anstataŭ U aperos okcidenta, kaj anstataŭ sk. aperos subkompreni.

Jam ekzistas testa versio de la nova PIV, sed ĝi estas dume alirebla nur por kelkaj elektitaj testantoj, kiuj povas eniri per pasvorto. Kiam la nova versio estos sufiĉe matura, tiu testa versio estos malfermita al la publiko, por uzo kaj kritiko, antaŭ ol estos publikigita la nova PIV. Ĝi estos laŭplane unuavice interreta vortaro (kiel la nuna versio de PIV2020 ĉe la adreso vortaro.net), sed el tiu materialo estos aŭtomate kreebla versio por tradicia libra publikigado.

Artikolo originale aperinta ĉe:

<https://esfconnected.org/2023/05/19/gisdatigo-pri-la-tekstaro-kaj-piv/>

5 BIBLIOTEKO HODLER IRIS AL VARSOVIO

Unu el la plej gravaj Esperanto-kolektoj (kaj planlingvaj kolektoj) en la mondo estas la Biblioteko Hector Hodler (BHH), kiun UEA konservis kaj kreskigis dum plena jarcento sur la bazo de la kolekto postmorte heredita de ĝia fondinto. Ties amplekso delonge superas la rimedojn,

kiujn UEA povas disponigi por ĝia prizorgo. Malgranda parto de la kolekto (ĉ. 5%) estis transdonita en 2021-22 al la Aŭstria Nacia Biblioteko, sed la grandega parto restis en Roterdamo en la oficeja domo de UEA, atendanta pluajn decidojn.

Tiel en 2022 formiĝis malgranda laborgrupo de CED (Fettes, Tonkin, Dubourg-Glatigny, Tuider) por provi trovi longdaŭran solvon por la restanta kolekto. Estis decidite sondi ĉe la Nacia Biblioteko de Pollando pro la historiaj ligoj de Esperanto kun tiu lando kaj kun Varsovio specife. Tuj venis pozitiva reago, kaj komence de 2023, post kelksemajna intertraktado kun la Nacia Biblioteko kun la helpo de advokato Piotr Karcz (membro de la financa komisiono de UEA), formala interkonsento estis atingita kaj subskribita. Dank'al la intensa laboro de Julia Konopka-Żołnierczuk, vic-direktorino de Nacia Biblioteko, la diversaj etapoj de transporto de la materialo (ĉ. 10 tunoj!) al Varsovio efektiviĝis rapide kaj sekure. La kolekto entenas ne nur librojn kaj periodaĵojn sed ankaŭ afiŝojn, flugfoliojn, instrumaterialon, bildojn, manskribaĵojn, sondokumentojn, filmojn kaj aliajn objektojn kiuj rilatas al la historio de Esperanto.

En la nuna momento, meze de 2023, la materialo estas sekigita, senpolverigita kaj pritraktata kontraŭ fungoj kaj acida damaĝo. La katalogado jam komenciĝis. La nacia biblioteko dungis kiel prizorganton la esperantistinon Gabriela Skonieczna, kiu ankaŭ rilatos kun la E-komunumo por la plukresko de la kolekto. Post 2-3 jaroj la tuta kolekto estos senpage konsultebla en la malfermaj horoj de la Nacia Biblioteko, kaj la katalogo estos rete alirebla por ĉiuj interesitoj.

5.1 *Malgranda biblioteka kolokvo inaŭguras novan epokon*

La 29-an de majo, 2023, ceremonio en Varsovio formale markis la transdonon de Biblioteko Hector Hodler al la Nacia Biblioteko de Pollando. Krom paroladoj de la kultur-ministro, la biblioteka direktoro kaj la prezidanto de UEA, okazis malgranda scienca kolokvo por iom pritaksi la signifon de tiu evoluo por interlingvistoj kaj esperantologoj. Jen resumo de la kvar prelegoj kun biografietoj de la prelegintoj.

Pascal Dubourg Glatigny

CNRS, Paris

La defio konservi transnacion heredaĵon: la futuro de kolekto Hodler

La interna historio de transnaciaj neinstituciaj komunumoj starigas novajn defiojn por la tradiciaj strukturoj de bibliotekoj kaj arkivoj. La plimulto de la kultura, movada kaj politika heredaĵo de la esperanto-komunumo estas ĝis nun konservata ĉe la sidejoj de plurcelaj asocioj kiuj ne disponas pri la necesaj fakaj laborfortoj nek pri la novaj teknikaj rimedoj de materialo-konservado. Ili senmetode kolektis kaj plu kolektas materialon el limigitaj teritorioj, eĉ se ilia havaĵo estas diversgrade tutmonda pro la specifeco de esperanto. La transdono de la plej vasta el tiuj kolektoj, la Biblioteko Hector Hodler el Roterdamo, kaj de la arkivo de UEA al respektive la naciaj bibliotekoj de Pollando kaj Aŭstrio, stabilaj profesiaj strukturoj, malfermas novan ĉapitron en la konservado kaj esplorado de tiu nekonata historio.

Pascal Dubourg Glatigny estas esplordirektoro ĉe la CNRS (Franca Nacia Centro por Esplorado). Li estas historiisto kaj esploras demandojn pri arto, arkitekturo kaj kulturo en la dimensio de interŝanĝoj inter disciplinoj kaj kulturaj spacoj. En 2014 li habilitiĝis kun libro pri la sciencaj konfliktoj ĉirkaŭ la restaŭro de la kupolo de Sankta Petro en Romo en la 18-a jarcento. Aktiva

de pluraj jaroj en la emerganta kampo de historio de la Esperanto-movado, li estas la iniciatinto de la esplorblogo «militrakonto»:

<https://mondmilito.hypotheses.org/>

de bibliografio pri la historio de Esperanto:

<https://hal.science/ESPERANTO-HISTORIO#>

kaj de la «Projekto Péraire», cifereca arkivo pri la vojaĝo al Azio de esperantista laboristo (1928-1932).

Ida Stria

Uniwersytet Warszawski / Magistra programo pri interlingvistiko, AMU

Havebleco de Esperantaj bibliotekaj kolektoj el lingvistika perspektivo

La internacia planlingvo Esperanto kreiĝis kiel alternativa lingvafrankao. Sed la fonto estis ne nur la deziro krei simplan komunikan ilon, sed prefere ponton inter homoj de malsamaj kulturoj kaj konvinkoj. Analizoj indikas, ke Esperanto estas plene evoluinta lingvo, kiu – krom sia origina komunika celo – havas ankaŭ funkcion integran kaj identecan.

Tiu ĉi speciala statuso de Esperanto kiel nature funkcianta, sed artefarite kreita lingvo signifas, ke ĝi povas esti esplormaterialo por multaj diversaj branĉoj de lingvistiko kaj ĝiaj rilataj sciencoj. En la prelego oni prezentos superrigardon de la esploroj sur la kampoj de Esperantologio kaj vaste komprenata interlingvistiko, kiuj okazas en pluraj signifaj centroj tra la mondo, tuŝante ankaŭ la akademian instruadon de tiuj fakoj kaj de Esperanto mem. En la fokuso estos la havebleco de bibliotekaj rimedoj – precipe en cifereca formo – kaj la graveco de evoluigado de ili por esplorado kaj universitata instruado.

Ida Stria doktoriĝis pri aplikata lingvistiko. Ŝi esploras Esperanton kadre de kultura lingvistiko kaj socilingvistiko. Ekde 2016 adjunkto ĉe la Universitato de Varsovio.

Denis Eckert

Géographie-cités, Paris / Centre Marc Bloch, Berlin

Varsovio kiel la deirpunkto por la disvastigo de la «universala lingvo»: La unuaj lernolibroj kaj vortaroj en Esperanto kaj ties aŭtoroj (1887-1890)

En la fruaj tagoj de Esperanto estis urĝa bezono doni al interesiĝantoj la rimedojn por lerni la bazojn de la lingvo. Komence mankis parolantoj kaj instruistoj: por ke la lingvo disvolviĝu kaj disvastiĝu, necesis rapide proponi memlernajn ilojn al la ĝenerala publiko, ekz. manlibrojn kaj vortarojn. Varsovio estas la deirpunkto de tiu ĉi propaganda laboro. Post la unuaj kvar kajeroj verkitaĵ kaj eldonitaĵ de Zamenhof en 1887 (en la rusa, pola, franca kaj germana), aliaj esperantistoj transprenis ĉi tiun laboron. Antaŭ la fino de 1890, jam 20 manlibroj kaj vortaroj en 16 diversaj lingvoj estis publikigitaj. Varsovio estis ŝlosila loko de tiu produktado: pluraj verkintoj estis varsoviaj kaj la plimulto de la broŝuroj estis presitaj en Varsovio. Multaj aŭtoroj de tiuj fruaj tekstoj havas rimarkindajn vivovojojn: inter ili Naftole Najmanovits kaj Julius Steinhaus el Varsovio, Gustaf Henriclundquist (Svedio), Richard Geoghegan (Anglio), Aleksandras Dambrauskas (Litovio), Marietta Frollo (Rumanio)...

Studinte historion kaj geografion, Denis Eckert doktoriĝis pri geografio (1992, Paris-1 Sorbonne Universitato), laboris pri la transformoj de la postsovetia spaco (Rusio, Ukrainio), kaj ankaŭ pri la tutmonda cirkulado de sciencaj konoj en la nuntempa mondo. Li laboris en Montpellier, Moskvo, Tuluzo, Berlino kaj Parizo. Li estis gastprofesoro en Leipzig kaj Montrealo. Ekde 2019, li esploras la tutmondan disvastiĝon de Esperanto inter 1887 kaj 1914, kun aparta fokuso pri lernolibroj kaj vortaroj. Li studis pli detale la serion de Unuaj Libroj aperintaj inter 1887 kaj 1892. Liaj malkovroj pri la frua historio de Esperanto estis prezentitaj en konferencoj en Vieno, Berlino, Ĉikago, Madrido kaj Parizo.

Marek Nahajowski

Akademii Muzycznej w Łodzi

Esperanto kaj muziksciencoj - la nuna stato kaj perspektivoj por plua disvolviĝo

Problemoj de komunikado je internacia nivelo aperas rilate al multaj aspektoj de la homa vivo. Tio aparte videblas ĉe la homsciencoj, al kies taskoj apartenas esplorado de diversaj aspektoj de homa kulturaktiveco, inkluzive de ties ĉefa portanto – la lingvo. Tio rilatas ankaŭ muzikologion kaj muzikteorion. En ĉi tiu kazo, aparte bona ekzemplo estas terminologio, kaj pli precize la fakto ke certaj nocioj estas ofte komprenataj malsame depende de la lingvo. Alia problemoj kunligiĝas kun la bezono de muzikologoj utiligadi lingvaĵon je alta nivelo literatura, kio kaŭzas, ke nur malmultaj el ili kapablas komuniki rezultojn de siaj esploroj internacie, sen la neceso pagi por traduko.

La nuna prelego celas prezenti ĝeneralan bildon de la eblecoj utiligadi Esperanton sur la kampo de la muziksciencoj. En la unua parto estos prezentataj la nuna stato de evoluo de la muzikterminologio en la Lingvo Internacia kaj la ĝisnunaj provoj de la praktika utiligo de la lingvo por scienca komunikado. Kiel ekzemplo servos, interalie, la revuo eldonata de la Muzikakademio en Lodzo, Pollando. La dua parto koncernos la gravecon de la Roterdama kolekto de Biblioteko Hector Hodler por entrepreni diversajn studojn pri la rilatoj inter Esperanto kaj muziko, kaj precipe pri la muzika kulturo de la internacia esperantlingva komunumo.

Marek Nahajowski estas muzikteoriisto kaj muzikisto ludanta rekreaĵojn de historiaj blovinstrumentoj (bekfluto, ŝalmo). Li estas profesoro ĉe la Muzikakademio Grażyna kaj Kiejstut Bacewicz en Lodzo (Pollando), kie li instruas pri la historio de muzikteorio kaj pri koncertpraktiko de la renesanca kaj baroka muziko; li gvidas ankaŭ la bekflutan klason. Li habilitiĝis en 2019 per disertaĵo pri la 18-jarcenta muzikhistoriografio. La sciencaj interesiĝoj de Marek Nahajowski koncentriĝas je muzikhistorio de la renesanca kaj baroka periodoj, je la historie bazita koncertpraktiko, je hermeneŭtika interpretado de kantverkoj, kaj je la Esperanta muzikkulturo.

IV PERSONOJ

La nova redakcio de Informilo por Interlingvistoj decidis reenkonduki la iaman kutimon de Dettlev Blanke omaĝi elstarajn interlingvistojn per biografia-bibliografia prezento okaze de signifa datreveno. En ĉi tiu numero, la elektito estas d-ino Ilona Koutny, kies longa kaj brila deĵoro en Universitato Adam Mickiewicz, Pollando, nun preterpasis 25 jarojn, kaj kiu en majo ĉi-jare festis sian 70-jariĝon.

1 JUBILEO DE ILONA KOUTNY (1953–)

1.1 Biografio

KOUTNY Ilona estas lingvisto, esperantologo, lingvoinstruisto; naskiĝis en Budapeŝto (Hungario) en 1953, ekde 1997 vivas en Pollando. Ŝi diplomiĝis pri matematiko, franca filologio kaj esperantologio en Eötvös-Loránd-Universitato (ELTE), Budapeŝto en 1977 (per esperantlingva temo: *Grandaj matematikistoj kaj la lingvomodeligo* ĉe István Szerdahelyi), poste studis ĝeneralan kaj aplikatan lingvistikon kaj doktoriĝis pri lingvistiko same en ELTE, en 1990 (per hungarlingva temo: *Aplikado de parolsintezo en la komputila instruado de la lingvoj hungara kaj esperanto*), habilitiĝis pri lingvistiko en Adam-Mickiewicz-Universitato (AMU), Poznano (Pollando) en 2009 (per anglalingva libro: *Naturlingva prilaboro por la hungara parolsintezo*).

Unue ŝi laboris en komputika tereno en esplorinstitutoj, poste kiel redaktisto, ankaŭ ĉe la iama Scienca Eldona Centro de UEA, en Budapeŝto (1983-85), estis kunredaktoro de la revuoj *Interkomputo* kaj *Fokuso*. Ekde 1986 ŝi okupiĝis pri parolprilaboro en la Budapeŝta Teknika Universitato, kunevoluigis la esperantan parolsintezan sistemon ESPAROL enkadre de plurlingva parolsintezista sistemo, kaj laboris pri parolantaj instruprogramoj PAROLERN. Ŝi kunlaboris ankaŭ kun la maŝintraduka DLT-projekto, pretigante hungaran modulon kun hungaraj kolegoj.

Post la morto de prof. István Szerdahelyi en 1987, ŝi transprenis la instruadon de e-aj lingvo kaj lingvistiko en la *Esperanto-fako* ĉe la Lingvistika Katedro de Eötvös-Universitato. Kunfondis la internacian Esperantologian fakon, kiu dum kelkaj jaroj funkciis kaj donis magistran diplomon pri esperantologio al la diverslandaj finstudintoj. Ŝi gvidis kursojn ankaŭ pri komputa kaj aplikata lingvistiko. Ŝi prezidis la Ekzamenan komisionon de HEA, kaj instruis kadre de la tiamaj C-kursoj.

En 1997 ŝi transloĝiĝis al Pollando (ŝia edzo, †Zbigniew Galor estis pola sociologo kaj esperantisto). Ŝi instruas en la Etnolingvistika Instituto (posteulo de la Lingvistika Instituto) de Adam-Mickiewicz-Universitato en Poznano hungarajn lingvon kaj lingvistikon. Ŝi gvidas la Hungarologian Katedron (inter 2010-19 la Finno-ugran Katedron). En 1997 ŝi fondis kaj gvidas la *internaciajn postdiplomajn Interlingvistikajn Studojn*, kiuj startis la unuan fojo en 1998, prelegas pri esperanta lingvistiko, internacia kaj interkultura komunikado, esperanto-instruado (<http://interl.amu.edu.pl>). De 2008 la Studoj kunokazigas kun ILEI kaj Edukado.net Instruistan trejnadon (ĉiun trian jaron, ligite al la instruista specialiĝo de la postdiplomaj Studoj en ties 3a jaro).

Por dece festi la 25 jarojn da spertoj kun la postdiplomaj interlingvistikaj studoj en AMU (entute 35 jarojn da sindediĉo al universitata instruado de Esperanto kaj 50 jarojn da esperantisteco) ŝi sukcesis fondi **magistrajn studojn pri interlingvistiko** kadre de la studdirekto *Lingvistiko kaj informmastrumado*, kie 10 ĉinaj studentoj komencis siajn studojn en 2022. Plurfoje kun kolego Michael Farris ŝi gvidis anglalingvan kurson pri *Internacia komunikado – internaciaj lingvoj* por la studentoj de la Lingvistika Instituto kun partopreno de kelkaj eksterlandaj Erasmus-gestudentoj.

Membro de la Akademio de Esperanto 1998-2016, profesoro ĉe la Akademio Internacia de la Sciencoj, San Marino, membro de UEA, ILEI (ekde 2016 honora membro), estis CED-estrarano, membro de la Hungara Aplikatlingvistika Asocio, eksmembro de la pola Fonetika Asocio. Ŝi ofte prelegas pri sciencaj temoj en diversaj forumoj (IKU, Esperantologia konferenco, ILEI-simpozioj, AIS-sesioj, KCE, GIL-konferencoj ktp.), gvidas esperantajn kursojn en diversaj niveloj (ekz. dufoje en Usono en la somera universitato NASK). Publikigas artikolojn en ses lingvoj, redaktis kelkajn librojn.

Ŝi kunredaktis la *Hungaran-Esperantan vortaron* (1996 kun I. Szerdahelyi, ĉ. 65 mil leksikaj unuoj kaj signifa faka materialo) kaj la *Hungaran-polan temvortaron* (2000 kun koleginoj, ĉ. 26 mil leksikaj unuoj). Ŝi laboras pri la plurlingva projekto **Strukturita Esperanta Temvortaro**, kies 3 volumoj kun leksikaj kaj komunikaj ekzercoj jam aperis: *Angla-Esperanta-Hungara etvortaro pri Lernado kaj Laboro* (2002), *Lingvo kaj Komunikado* (2003), *Homa vivo kaj Loĝado* (2005). Aldoniĝis la Angla-Esperanta-Litova versio de Lernado kaj Laboro (2005), poste la Germana-Esperanta-Pola versio de Lingvo kaj Komunikado en 2008. Ŝi estis redaktoro de la universitata lingvistika revuo *JKI* («*Lingvo. Komunikado. Informado*», 2011-19, <http://jki.amu.edu.pl>), kie regule aperis ankaŭ esperantologiaj kaj interlingvistikaj artikoloj kaj esperantaj resumoj. Tiu ĉi agado daŭras ekde 2021 ĉe la alia universitata lingvistika revuo *Investigations Lingvisticae* (<http://pressto.amu.edu.pl/il>).

Ŝi esploras **interkulturan komunikadon** kaj la **rilatojn inter kulturo kaj lingvo, leksikografion, esperantan lingvistikon**. Organizis interlingvistikajn simpoziojn en AMU kie partoprenis esperantistaj kaj ne-esperantistaj fakuloj pri la anoncita temo. Post la 5-a simpozio en 2020 ŝi kun Ida Stria kaj Michael Farris redaktis du volumojn kiujn eldonis la universitato en la serio *Cross-linguistic and Cross-cultural Studies* (kies seria redaktoro ŝi estas).

HEA donis al ŝi honorinsignon en 1989, UEA Grabowski-premion en 2008 kaj Diplomon pro elstara agado en 2015. Post la festado de 10-jariĝo de la Interlingvistikaj Studoj per interlingvistika simpozio ŝi estis elektita la Esperantisto de la jaro 2008 far la revuo La Ondo (intervjuo: <https://esperanto-ondo.ru/Novaj/Nov09-01.htm>). En 2018 ŝi ricevis la FAME-premion.

Vidu ankaŭ:

<http://interl.amu.edu.pl/interlingvistiko/Ilona.html>

Retadreso:

ikoutny@amu.edu.pl

Intervjuoj

- Intervjuo kun Ilona Koutny, *Esperanto* 2019/1
- pri la studoj en Esperanto, *IPR* 2023/1
- *Pola retradio*

– https://pola-retradio.org/2023/01/e_elsendo-el-la-25-01-2023/

- Vidu ankaŭ biografion en: GORECKA, H. kaj A. KORĴENKOV, redaktoroj (2018). *Nia diligenta kolegaro*. Kaliningrad: Sezonoj

1.2 Selekta bibliografio

1.2.1 Artikoloj

1.2.1.1 1984 – 1989

GORDOS, G., Ilona KOUTNY kaj L. OSVÁTH (1989). «Some research on phonetically based speech recognition», angla. En: *Proc. of Speech Research*. Budapeŝto: MTA Nyelvtud. Int.

KOUTNY, Ilona (1984). «Diversaj aspektoj de perkomputila tekstoprilaboro», en: *Internacia Komputado* **1984/2**: 4–7.

— (1985b). «Problemoj de esperanto en la aŭtomata tekstoprilaboro», en: *Planlingvistiko* **1985/3**: 7–13.

